Clarence Bicknell,

# Soneto

En ĝardeneto sola rozo floris:
Ĉe l' norda land' ne kreskis roz' pli bela;
Nenio en naturo pli odoris;
Ĝarden' nenia estis tiel hela.

Dancadis ĉiam apud ĝi fraŭlinoj;
Poetoj lertaj laŭdi ĝin ne ĉesis
Kaj sub la lumo pala la feinoj
Akvumis ĝin kaj l' ombron eĉ karesis.

Senzorga, ve! la ĝardenist' fariĝis!
Fraŭlinojn kaj feinojn li formetis;
Raŭpar', pro senpluveco, amasiĝis,

Kaj sin sur floron kaj foliojn ĵetis.
Di' gardu ĉion! Helpon se ne portas
Ĉielo, la plej bela floro mortas!

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas* Clarence Bicknell *(∗1842-10-27 – †1918-07-17).*

*Arg-970-1952 (2014-02-15 20:57:42)*

*Tiu ĉi poemo troviĝas en la retejo* `http://eo.wikisource.org/wiki/Soneto_(Bicknell)`*. Pri la poeto vidu la vikipedian retejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Clarence_Bicknell`*.*